

## Oftaj demandoj / FAQ

### **En kiuj laborkampoj la Esperanto Internacia ĉefe volas labori?**

La nova fondaĵo “Esperanto Internacia” ĉefe laboros rilate al Esperanto -informado kaj Esperanto-instruado. Tiel ĝi estas la ununura internacie laboranta Esperanto-organizaĵo, kiu laboros preskaŭ ekskluzive en tiuj laborkampoj.

### **Kiun garantion mi havas, ke la fondaĵo vere uzos la monon por tiuj celoj?**

La statuto de la fondaĵo diras klare, ke ĝi devas elspezi minimume 75% de la rimedoj por tiuj laborkampoj (sen eventualaj celdonacoj por aliaj laborkampoj). Tiel estas klare, ke la fondaĵo vere laboras kaj agadas por la disvastigo de Esperanto.

### **Kial la fondaĵo ne uzos 100% por Esperanto-informado?**

La fondaĵo jam per 75% estas “gvidanto” en la mondo de Esperanto-organizaĵoj. La plej multaj ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj eĉ ne elspezas 10% de la buĝeto (kelkaj eĉ multe malpli) por informado kaj instruado. Ne eblas investi 100%, ĉar necesas kelkaj elspezoj por aliaj kampoj kaj administrado. La fondaĵo tamen laboros plej ŝpare; ĉefe per honoroficaj fortoj kaj se eblas oni uzos pli ol 75% por la agadkampoj.

### **Ĉu oni povas fariĝi “membro” de la fondaĵo?**

Esperanto Internacia ne estas membro-organizaĵo laŭ la tradicia signifo de la vorto. La fondaĵo tamen ofertas fariĝi “amiko” aŭ “simpatianto”. “Amikoj” havas tre similan statuson, kiel membroj en membroasocioj, do oni povas influi la politikon de la fondaĵo. Sendepende iu ajn persono povas subteni la celojn de la fondaĵo aliĝante kiel “simpatianto”. Kvanto ankaŭ gravas!

## **Kion mi ricevos, se mi fariĝos “amiko”?**

La fondaĵo ne donas servojn. Temas pri idealisma organizaĵo kaj la “amikoj” baze ricevas la ĝuon, ke oni vere agadas per la rimedoj. La fondaĵo do estas la natura elekto de homoj kiuj deziras, ke la lingvo “Esperanto” estos pli vaste uzita ol nun kaj ke la kvanto de parolantoj altiĝas.

## **Ĉu la fondaĵo konkurencas kun aliaj Esperanto-organizaĵoj?**

Nur se oni vidas la vorton “konkurenco” pozitive oni povas paroli pri konkurenco. La fondaĵo devas realigi celojn kaj por tiu realigo ĝi bezonas rimedojn. En tiu senco ĝi “konkurencas” Tamen temas pri amika “konkurenco”. Por la realigo de la celoj necesas harmonie kunlabori, respektante la ideojn de la aliaj. Pragmatikan kritikon ni kompreneble akceptas.

## **Ĉu la fondaĵo estas kontraŭ aliaj fluoj inter la Esperanto-parolantoj?**

Kompreneble ne! Laŭ la filozofio de la fondintoj necesas kunlaboro. Se oni kritikis, oni kritiku pragmatike, ne detruie. Se kritiko rilatas al personoj oni kritiku amike, sed ne ofende, respektante ankaŭ la sentojn de homoj, atentante pri ilia kulturo. Homfortojn kaj energion oni uzu ne por kvereli, sed por la celoj. Persono, kiu volas festi ĉe kongreso ,festu! Persono, kiu volas skribi poemon, skribu poemon kaj persono, kiu volas instrui Esperanton ĉe universitato, instru. Ĉio estas ligita kaj unu afero dependas de la alia. Toleremo gravegas!

## **Kiaj estas la rilatoj kun UEA?**

Estas tro frue por respondi tiun demandon, ĉar ankoraŭ ne ekzistas oficialaj rilatoj. Ni tamen supozas, ke la rilatoj estos tute bonaj kaj amikaj. Ne ekzistas kaŭzo por la kontraŭo. UEA havas oficialajn rilatojn kun UN kaj UNESKO, aranĝas la plej grandan kaj internacian Esperanto-kongreson; havas libroservon kaj eldonas membro-revuon. Ĝi donas servojn al la Esperanto-parolantoj, kiuj deziras tiujn servojn. Sur tiuj kampoj ĝi certe agas tre bone. Kompreneble ĉiam restas aferoj, kiujn oni povus plibonigi, sed tio estas tute alia temo kaj ĉi tie ne estas

la adekvata loko por diskuti tion. Grava afero estas, ke oni harmonie kunlaboru sur la agadkampoj de la fondaĵo.

### **Kiel mi povas helpi al Esperanto Internacia?**

Ekzistas pluraj formoj kiel vi povas helpi. Se vi volas helpi finance, vi povus fariĝi “amiko” aŭ donaci por unuopaj projektoj; se vi volas helpi morale, vi povus fariĝi simpatianto. Kompreneble ankaŭ gravegas helpantoj pri plej diversaj temoj, instruistoj, farantoj de retpaĝoj, tradukistoj, verkistoj kaj personoj, kiuj helpas ĉe administraj laboroj. Faru proponon!

### **Kial Esperanto Internacia opinias ke edukado de la Esperanto-parolantoj estas grava por la sukceso de Esperanto?**

La Esperanto-movado ĉefe laboras per honoroficaj fortoj. Ju pli bone oni tamen laboras, des pli bone estos la rezultoj. Tial ni opinias ke esence gravas altigi la sciojn de la volontuloj en diversaj “sciencoj”. Ĉefe gravas altigi la sciojn en la jenaj sektoroj: instruado, intervjuoj, verkado de gazetaraj informoj, grupdinamiko kaj aliaj similaj temoj. Fora celo povus esti havi iuspecan “virtualan universitaton” kun tekstoj kaj filmoj pri la diversaj temoj. Tia “universitato” ankaŭ donus ĝeneralan uzeblecon por parolantoj de Esperanto.

### **Kial Esperanto Internacia volas okupiĝi pri internacia adresaro?**

Nur informado certe ne helpas. La novaj lernantoj devas havi uzeblecojn, ĉar en alia kazo ili mallernos la lingvon aŭ opinios ke la lingvo ne estas utila. La kreo de centra kaj redaktita adresaro tre gravas por havi la eblecon kontakti aliajn parolantojn.

***Ĉu vi havas aliajn demandojn? Skribu al ni kaj ni volonte respondos!***